# tejo:aktuale

n°509 | Oktobro 2025

**Novaj volontuloj salutas vin el Roterdamo!**
Freŝaj homfortoj en la Centra Oficejo! Vi jam povas ekkoni ĉiujn niajn novajn volontulojn: Franĉesko, Kjara kaj Konrado - kiuj ekde nun kun entuziasmo preparados eldonojn de **TEJO-aktuale.** En tiu ĉi numero vi trovos informojn pri aktualaj eventoj kaj alvokoj: reta trejnado, kandidatiĝoj por Komitatano B, la Virtuala Kongreso kaj la venonta Junulara E-Semajno apud Berlino.
Agrablan legadon kaj inspirajn momentojn en Esperantujo! 🌍

## ALVOKOJ




### Iĝu Komitatano B de TEJO

La 1-a de decembro 2025 estos la oficiĝtago de la novaj Komitatanoj B de TEJO, kiuj reprezentas la individuajn membrojn de nia organizo.

Hodiaŭ estas **la lasta tago** por sendi vian kandidatiĝon, rapidiĝu!

Jen la plena teksto de la alvoko.

## ANONCOJ




### Aktivula Trejnado

La 25-an de oktobro okazis trejnado gvidita de Leandro Abrahão, pri kiel krei engaĝajn kaj praktikajn retajn trejnadojn. Li montris kiel adapti la trejnadoplanon al la publiko kaj disvolvi strategiojn por efike prezenti antaŭ kamerao.

Se vi maltrafis la eventon, vi povas ankoraŭ malkovri liajn konsilojn kaj teknikojn per la registraĵo. Spektu ĝin en nia jutuba kanalo.

### Nova TEJO-volontulo: Konrad'




Konrado venas el Pollando kaj ĵus komencis sian volontulan sperton ĉe TEJO. En sia rakonto, li parolas pri siaj unuaj tagoj en la Centra Oficejo, la etoso de la teamo kaj la vivo en Roterdamo. 🌍
Lia vivdevizo? "Oni vivas unufoje, do foruzu vian tempon saĝe kaj ĝuu ĝin"




### Nova TEJO-volontulo: Franĉesko

Franĉesko el Italio, la dua el la novaj TEJO-volontuloj, rakontas pri sia vojo al Esperanto kaj kion signifas por li esti parto de la esperantista komunumo - de tute freŝa vidpunkto de novulo.
Lia vivdevizo? "Kun malmulte da akvo, la anaso ne flosas"




### Nova TEJO-volontulo: Kjara

En sia prezento, Kjara el Italio diskonigas sian amon al muziko kaj lingvoj kaj siajn unuajn pensojn pri vivo kaj laboro en Esperantujo. En Roterdamo ŝi celas plivastigi siajn horizontojn kaj persone kreski per nova internacia sperto.
✨
Ŝia vivdevizo? "Se vi ĉiam povos resti en la nuntempo, vi estos feliĉa homo"

---

## EVENTOJ




### Virtuala Kongreso de Esperanto

Marku vian kalendaron, VK okazos ĉi-jare **de la 4-a ĝis la 7-a de decembro**! La kongresa temo estas “Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj”.

👉 Individuaj membroj de TEJO/UEA povas aliĝi senpage ĝis la 23-a de novembro.




### Junulara E-Semajno

JES 2025/2026 okazos proksime al Berlino, **en Burg (Spreewald), de la 28-a de decembro ĝis la 4-a de januaro**.

Kune kun pli ol 200 homoj el almenaŭ 20 landoj ni ĝuos la jarfinon en unika etoso! Atendas vin agrabla tempo, renkontiĝoj kun interesaj homoj kaj multaj bonaj travivaĵoj.

Ne plu prokrastu vian aliĝon, por pliaj detaloj pri la aliĝo vizitu la retpaĝon.

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**





Novembro alportos subitajn ŝanĝojn kaj kelkajn defiojn, sed ankaŭ novajn ŝancojn. La steloj sugestas, ke ĝi estas perfekta tempo por konektiĝi kun la movado - ekzemple aliĝi al almenaŭ unu el la sekvaj E-eventoj, se vi ankoraŭ ne faris tion.




♈ Novembro estos la momento por komenci novajn projektojn en la Esperanto-komunumo. Pensu pri kontribuado al nova retejo aŭ forumo - via idearo estos tre valora. Se vi planas vojaĝi al UK en 2026, preparu vin por la vojaĝo!




♉ La tempo estas perfekta por proponi viajn iniciatojn en la Esperanto-movado. Ĉu vi planas organizi lokan eventon aŭ traduki materialojn por via grupo? Stabileco kaj persistemo estos viaj fortoj ĉi-monate.




♊ Novembro donos al vi ŝancon profundigi viajn diskutojn kaj tradukojn. Ĉu vi pensis pri partopreno en loka foiro aŭ helpo pri traduko de la novaj flugfolioj de via grupo? Via komunikemo estos atuto en la varbado.




♋ Novembro estas por vi la tempo por novaj iniciatoj en la kultura kampo de Esperanto. Ĉu vi partoprenos literaturan projekton aŭ kunhelpos organizi eventon? Via pasio por la lingvo brilos ĉi-monate.

♌ La steloj alvokas vin gvidi viajn samideanojn. Vi kaptiĝos pri organizado de eksperimenta trejnado. Via karismo instigos ĉiujn sekvi vin.




...sed dum semajno vi ploros senĉese. Vi forgesis aliĝi senpage al VK!




♍ Novembro estas perfekta tempo por labori pri detaloj. Se vi ne helpis ankoraŭ en la redaktado de la loka gazeteto aŭ traduko, nun estas via ŝanco. Fokusiĝu pri precizaj taskoj, kiuj fortigos la komunumon.




♎ Ĉu vi pensas pri nova projekto por la movado? Novembro estos ideala por lanĉi novajn ideojn kaj interŝanĝi opiniojn kun aliaj esperantistoj. Via ekvilibro inter teorio kaj praktiko estos tre utila.




♏ Se vi havas profundajn ideojn por la Esperanto-movado, novembro estos la tempo por komenci realigi ilin. Eble nova traduko aŭ literatura kontribuo estas en via estonteco. Profundaj projektoj estos en via horizonto.




♐ Ĉu vi planas vojaĝi al Esperanto-eventoj en la venontaj monatoj? La steloj sugestas ke novembro estos ideala por malkovri novajn vojojn por engaĝiĝo. Tiaj vojaĝoj alportos novajn ideojn kaj kunlaborojn. Vi komencos en KKPS.




♑ Novembro estos la tempo por strukturi kaj finpretigi viajn longtempajn projektojn. Se vi pensas pri libro aŭ traduko, la steloj apogas vian seriozan aliron. Fokusiĝu kaj preparu vin por nova etapo.




♒ Via teknika lerteco estos tre utila ĉi-monate. Ĉu vi planas krei novan programon aŭ retejon por la Esperanto-movado? Novembro alportos multajn mirindajn ŝancojn por novigo kaj kunlaboro.




♓ Ĉu vi verkos novan poezion aŭ kontribuos al literaturaj projektoj? Novembro estos ideala por esplori viajn kreemajn flankojn en Esperanto. La komunumo estos inspirita de viaj ideoj kaj profundo.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands